

# Gazeto *Andaluzia*

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO


12a

Jarkolekto

\*

Oktobro, 1995

N-ro 43



## GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

Efika Esperantismo/10	3
Por ke Esperanto restu viva	5
Someraj Lingvaj Aventuroj	8
Alvoko	9
La anteno kaj la elektromagnetaj ondoj	10
Krucvortoj	12
Poezia Angulo	14
10 sciindaj aspektoj pri Esperanto kaj la komunumoj aŭ esperantistaj propraj ŝtatoj	17
Recenzoj: Perkomputila Esperanta Kurso	19
Politiko, Lingvo kaj Esperanto	21
Esperanto Aplikata	24

Fine de la somero jen denove la revuo por la AEUanoj, kun kelkaj legaĵoj kiuj celas informi kaj pluformigi vian esperantistecon... krom la kutimaj enigmoj kaj komercaj anoncoj por praktigi nian ŝatatan lingvon...

Vi povos legi pri multaj malsamaj aferoj... sed se vi ankoraŭ ne trovis kion vi ŝatus legi, kial vi ne kunlaboras kun ni? Ek, sendu al ni artikoleon kaj vi povos legi vian nomon sur ĉi tiuj paĝoj...



## **Efika Esperantismo / 10**

En du jarcentoj nia materiala mondo tute ŝanĝiĝis. La ŝanĝiĝo estis kvanta, rapida kaj profunda. Antaŭ du jarcentoj, la plimulto da homoj loĝis en kamparaj vilaĝoj, la produktado estis metia, kaj la komunikiĝoj laŭvele sur la maro kaj surtere per la tiel nomata sanga transporto: ĉaroj tirataj de bovoj, muloj aŭ ĉevaloj. La tiamaj regnoj, antaŭaj kaj postaj al la franca revolucio, estis relative vastaj. Por transiri la ŝtatajn landojn oni bezonis multajn tagojn, sed malmultaj vojaĝis, preskaŭ ĉiuj vivadis en sia naskiĝloko. Tiela estis la materialaj strukturoj en kiuj vivadis la plimulto da homoj.

Tiam, la mensa karaktero aŭ ĝenerala pensmaniero estis adaptita al siatempa realo. Nia aktuala realo eĉ ne povis esti konceptita. Nuntempe, la plimulto da homoj loĝas en grandaj urboj. La produktado de varoj estas fabrika kaj la agrokulturo meĥanika. La aviado, la elektronikaj aparatoj, la atomenergio... Ĉio alvenis pro la ĉeno mem de la okazaĵoj, precipe pro la prospero de la scienco kaj tekniko. La progreso ne estis alportata de konscia agado de la homoj, ĝi venis per si mem. Kaj la materiala progreso, tiel same povas alporti, jen bonfarton, jen detruon.

En du jarcentoj disfalis tradiciaj kredaĵoj, kaj aliaj kredaĵoj anstataŭis la pasintajn. Se kelkaj fanatikecoj foriĝis, aliaj fanatikecoj alvenis. Se oni perdis la fidon en mirakloj, alvenis ideologioj, kiuj kredigis sociajn miraklojn. Multaj pretendas solvi perforte la sociajn krizojn. Nuntempaj revoluciemuloj, vidante, ke pro la forto de la ŝtato jam ne plu eblas popolaj revolucioj, fidas la efikon de terorismo.

La nuna pensmaniero estas ĥaosa. Unuj revas pri la pasinteco kaj volas revivigi etnajn lingvojn kaj restarigi mezepokajn regnojn. Aliaj, konceptante idealigitan naturon, eĉ revas pri primitiva vivado. Tamen, la plimulto volas vivi komforte kaj pace, priokupiĝi pri nenio, sed ili ne restas imunaj al la ideologiaj ŝtormoj.

Ni, nuntempuloj, ne povas percepti la estontecon tiel prosperan kiel oni iam imagis. Antikvaj kaj novaj fanatikecoj alvenas, integristoj disvastiĝas kaj se la krizo akriĝas, neniu povos resti izolita, ĉiuj suferos la sekvojn. Vole aŭ malgraŭvole, ni ĉiuj, tutmondanoj, jam estas samsortuloj, tiel same en la prospero, kiel en la ruino. La materialaj strukturoj unuigis la tutmondan surfacon, sed la mensaj strukturoj ne kongruas kun la materiala realo.

La antaŭaj sociaj ideologioj fiaskis. Ne ŝajnas, ke novaj ideologioj alportos la solvon. La vivo estas tre varia por ke unika ideologio



kapablu enkorpiĝi la kompleksecon de la vivado. La nuna socia krizo ne estas ideologia, sed pri pensmaniero. Ni devas kutimiĝi pensi mondscale kaj tuthomare. Ni devas pensadi, ne laŭ la nuno kaj loke, eĉ ne laŭ la pasinteco, sed laŭ la irinda vojo al la estonteco. Unufoje en la tuta historio alvenis la momento konstrui civilizacion, ampleksanta la tutan mondon kaj la tutan homaron.

Se nova civilizacio devas alveni per si mem, spontanee, laŭ la ordinara antaŭenirado de la historio, movata ankoraŭ de konkurado, subpremado, militoj kaj perfortaj revolucioj, la homaro riskas pereigon. La atom-bombo estis kreaĵo de eta malplimulto da sciencistoj, sed ĝiaj sekvoj afekcias ĉiujn, havantaj neniun rilaton kun la malkovro de la atom-energio. Tamen, tiu malkovro indikas la eblan alvenon de nova civilizacia etapo.

Por alfronti tiun defion estas necese adapti la mensajn strukturojn aŭ pensmanieron al la materialaj strukturoj de la nuntempo kaj al la antaŭvideblaj de la proksima estonteco. Nova pensmaniro devas ĝeneraliĝi. Tio ne estas ideologio, sed novaj normoj de konduto por ebligi tutmondan pacan kunvivadon en universala jura ordo.

En la komenco de nia dudeka jarcento la esperantismo estis idealismo el romantika deveno, nun tiu idealismo fariĝas deviga realismo. La revado pri idealismoj ne sufiĉas. Tiam la esperantistoj pensis, ke lingvo internacia alportos homaran interkompreniĝon. Nun la afero aliiĝis, la volo interkompreniĝi devas esti la motivo por lerni la internacian lingvon.

Nuntempe, la homarunuiĝo jam ne kuŝas en la disvastiĝo de helpa internacia lingvo, ĉar la angla lingvo kvazaŭ rolas kiel internacia. Esperanto devas fari, kion ne povas fari la angla lingvo, tio estas, fariĝi la kultura portanto de tio, kion diras "La Espero": esti la ideo-forto por unuigi la homaron.

GIORDANO MOYA





## Por ke Esperanto restu viva!

Ĉu la lingvo Esperanto kaj la Esperanto-movado ankoraŭ ekzistas? Kaj se jes, ankoraŭ kiom longe? Eldonantoj de libroj, kasedoj ktp ĉiutage frontas la problemon pri la magra kvanto de aĉetantoj (averaĝa eldonkvanto de libroj: 500 ekzempleroj. Krome, antaŭe ekzemple en Hungario en 1 jaro oni eldonis 36 E-librojn, nun 1...), organizantoj de aranĝoj nur revas pri amasa partopreno (antaŭ dekelkaj jaroj ekz. UK partoprenis ĉirkaŭ 1000 gejunuloj, nun 200), kaj esperantistoj-aplikantoj amare renkontas la kreskantajn problemojn kaj prezojn (memoru pri la *ĉielaj* prezoj de UK-95).

Ĉio ĉi povus esti nur subjektiva pritakso, se ni ne rigardus la konkretajn ciferojn. En la apuda tabelo estas montrata la kvanto de UEA-membroj en la lastaj jaroj (fonto, UEA).

Membronombroj de UEA:

jaro	AM	IM	sume
1979			30810
1983			37501
1987	36351	7291	43642
1989	32474	7355	39829
1991	19146	8071	27217
1993	16041	7272	23313
1994	14495	7018	21513

AM= asocia membro; IM =  
individua membro

### Ne kulpas la soclandanoj!

Ofte oni aludis, ke la malkreskon de membroj kaŭzis la orient-eŭropaj ŝanĝoj - sed tio ne estas vera, almenaŭ ne tiel globale! La ŝanĝoj en orienta Eŭropo komenciĝis en novembro-decembro de 1989, do efiko de tiuj aferoj povas esti respegulata en la UEA-statistiko plej frue en la datumoj de 1992!

La falon post 1987 ĝis 1992 do kaŭzis ne tiu fenomeno, sed tute aliaj faktoroj. Evidentas, ke esperantistoj atendis *ion*, ian elstaran sukceson de la jubilea jaro por la disvastiĝo de Esperanto. Tio ne okazis, eĉ paralele la mondo eksplode internaciigis, tankiras antaŭen la angla - kaj multaj niaj iamaj homoj jaro post jaro seniluziiĝas, ekŝiĝas.

### Paralelaj tendencoj

Evidente la Esperanto-komunumo konsistas ne nur el UEA-membroj. Sed ni devas konscii, ke ĝi estas la plej granda, kaj ĝenerale respegulas la staton de Esperantujo. Se ĝenerale en monda dimensio kreskas la nombro de UEA - kaj ankaŭ inverse! Kompreneble en iuj landoj povas ekzisti kontraŭaj tendencoj pro aktiva, altnivela laboro de iu kolektivo, pro lokaj cirkonstancoj, ktp., sed en monda



dimensio la UEA-statistikaĵo tamen estas korelativa (samtendenca) al la ĝenerala bildo...

### Kritika (kriza) maso

La malaltiĝo de membronombro (aŭ ĝenerale la nombro de esperantistoj, servo-uzantoj) en si mem ne estas granda problemo -- ĝis tiu malkresko atingas iun kritikan (krizan) nivelon. Se la nombro de servo-uzantoj tro malkreskas, malmultiĝas kaj plikostiĝas la E-servoj (perdas la allogan karakteron), kio kaŭzas plian neuzon de tiuj servoj kaj plian

	1983	1992	1993
Nombro de libroj	219	205	136
Sumo de paĝoj	33139	25789	18511
Tradukitaj beletraĵoj	42	31	28
Averaĝa paĝkvanto	151	126	136
Averaĝa prezo	15.2	15.9	20.1

eksiĝon, kio denove kaŭzas la malaperon de E-servoj, aplikebloj...

Tiu diabla spiralo estas mort-danĝera al ĉiu firmao kaj same al nia E-movado! Esploru la sekvan tabelon (kompilita laŭ la revuo *Esperanto* en la redakcio de *Ruslanda Esperantisto*):

La konkludon faru vi mem.

### Strategio necesas!

Tiuj fenomenoj estas videblaj ne nur nun. Kiam ni startigis la gazeton *Eventojen '92*, ni jam vidis ĝin kaj la temo *strategio* daŭre ricevis primaran prioritaton (vidu la fi?-faman artikolon de J. Werdin en '92, la artikolojn postulantajn *laborajn kaj strategiajn kongresojn* en Vieno, Valencio, kto.). Ni klopodis atentigi la komitatanojn kaj estraron de UEA, sed nia voĉo estas tre mallaŭta. (Kaj mi estas nek A- nek B-komitatano de UEA...)

### Haltigu la spiralon!

Por perspektiva ekzisto de nia komunumo ni devas haltigi la falon de organizitaj membroj! Ni devas analizi la kaŭzojn, la motivojn kaj devas pripensi la sekvidan vojon. Tiu proceso de ellaboro kaj plenumo nomiĝas *strategio*...

Ekzistas aliaj, same neprofitcelaj organizoj, kiuj estas sukcesaj. Memoru pri la feminisma, verdula,

vegeteranismaj movadoj. Ni devas atenti pri iliaj manieroj, kaj apliki la utilajn elementojn.

### Ne ploru! Agu!

Por haltigi kaj returni la nunajn tendencojn plejn unue ni devas zorgi pri niaj jamaj membroj. La plej unua paŝo devas esti la zorgo pri la baza informfluo, kaj solvo de la eduka



parto de la lingvo-instruado.

Se la informfluo ne estas solvita, la informoj pri aranĝoj, libroj, eldonaĵoj, servoj ne atingas la potencialan uzanton... Kaj inverse, la renkonto de diversaj servoj generas la deziron fari aliajn.

### Pionira paŝo en Hungario

Dum la ĉi-jara Ronda Tablo de hungariaj E-organizoj (estas ĉirkaŭ 20), la ĉeestantoj post longa preparo fine akceptis la sekvajn strategiajn decidojn:

Partoprenantoj de la Ronda Tablo konsentas pri tio, ke se oni volas restigi viva kaj disvastigi la Esperanto-movadon, estas fundamente necese ligi la lingvolernantojn al la Esperanto-komunumo kaj movado. Por tiu celo

1. La subskribantaj organizoj faras nur tiajn lingvo-instruadojn, E-kursojn, kie krom la lingvaj elementoj ankaŭ la instruado de

-la bazo de Esperanta kulturo,

-movada strukturo,

-enmovadaj servoj

kaj ilia konkreta uz-maniero

estas konsiderataj kiel integra parto de la instrua proceso.

2. La subskribantaj organizoj konsideras fundamenta postulo, ke la instruisto (kurs-vidanto) ankoraŭ antaŭ la fino de

la kurso instigu ĉiujn lernantojn al la abono de iu internacia Esperanta gazeto, certiganta la bazan informfluan.

3. La subskribantaj organizoj akceptas kiel celo, ke ĉiu ilia membro abonu al iu internacia Esperanta gazeto, certiganta la bazan informfluan.

Estas certe, ke tiuj paŝoj ne sufiĉas por haltigi la tendencon, sed ili estas la unuaj paŝoj. Pri pliaj paŝoj por plibonigi la servojn, en praktigo utiligi la lingvon, faka aplikado ktp serioze oni povas pensi nur post la plenumo de tiuj unuaj, nepre necesaj paŝoj!

### Kiu sekvos?

Evidente la problemo ne estas nur hungaria. Dependas de la konscienco de estraranoj, aktivuloj de ĉiuj E-societoj, kiel daŭrigas nia vojo. La suprajn decidojn ni proponas al la atento de ĉiuj konsciaj Esperanto-organizoj. Kaj fine mi esperas, ke la temitaj *internaciajn E-gazetojn* (kaj ne nur *Eventojn*) oni volonte kaj kun utilo legos – eĉ sen pornografiaj temoj.

LÁSZLÓ SZILVÁSI





## Someraj Lingvaj Aventuroj

Kiel esperantisto, mi kutime aŭdis pri la neceso de vehikla lingvo kiu estus utila por komprenigi ĉiujn nin en la tuta mondo; kaj ankaŭ kiel esperantisto mi ĉiam defendis ke la plej taŭga el la lingvoj por plenumi tiun taskon estas la internacia lingvo Esperanto. Tamen mi, escepte de kvintaga vojaĝo al najbara Portugalio, neniam sentis reale la neceson de internacia lingvo. Sed lastsomere mi bone komprenis la gravecon de la ekzisto de vera helpa idiomo. Aŭskultu kion mi rakontos.

Pro laboraj kialoj dum la lasta somero mi deĵoris ĉe informloko kiun la Trafika Departamento situas apud la kordova vilaĝo Villa del Río. Ĉi tiuj lokoj utilas ĉefe kiel ripozejo por la marokaj stiristoj kiuj trapasas Hispanion en sia vojaĝo el Centra Eŭropo ĝis la nordo de Afriko. Krom ripozejo ĉi lokoj estas utilaj por ricevi informojn, manĝi, aĉeti la ŝip-biletojn kaj eĉ por preĝi, ĉar tie ankaŭ ekzistas marabuto. Mia tasko estis organizi la eniradon kaj eliradon de aŭtomobiloj, informi pri aferoj rilataj la trafikon kaj la vojojn, k.s. Ni estis du deĵorantoj, krome kuracisto kaj tradukisto, kiu scipovis la anglan kaj la francan kaj iomete la germanan. Bedaŭrinde ĉi lasta laboris nur dumvespere, tamen ni devis esti tie dum 24 horoj.

Mi neniam povis imagi la

konfliktojn kiujn kaŭzas la nekomprendado al personoj parolantaj malsimilajn lingvojn. Mi ĝis nun pensis ke la angla kaj la franca sufiĉis por kompreni la tutan mondon, sed tio ja ne estas vera. Mi parolas ambaŭ lingvojn, tamen konversacii kun la marokaj elmigrantoj kiuj petis informojn estis tre, tre malfacile, nek mi nek ili regis la lingvon. Kiam la demandoj temis pri sekvindaj vojoj la problemo ne estis tro grava, ĉar sufiĉis landkarto kaj krajono, tamen la afero estis pli grava kiam la problemoj estis pri malsanoj. Ofte mi agis kiel tradukisto inter la malsanulo kaj kuracistino, kaj tucerte ne kompreni aŭ ne komprenigi ion kiam oni parolas pri malsanoj ne estas agrabla afero.

Sed la plej kurioza afero okazis kiam maroka stiranto loĝanta en Nederlando petis al ni helpon ĉar sia aŭtomobilo difektiĝis. La sekvenda ag-maniero estis tre simpla: telefoni al la hispana delegitejo de sia nacia asekurkompanio. Tion mi agis sed tie oni ne parolis la nederlandan lingvon, do mi devis agadi kiel tradukisto inter la nederlandano kaj la kompanio. Sed kiel, mi tute ne komprenas la nederlandan! La solvo estis iomete stranga; flandra stiranto helpis min, ĉar li parolis la

*(Daŭrigo sur la paĝo 16)*





## Alvoko

Alvoko Al la Prezidanto de la Komitato por la homaj rajtoj. Al la Ĝenerala Direktoro de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko). Al la Ĝenerala Sekretario de Konsilio de Eŭropo. Al la Prezidanto de la Eŭropa Parlamento. Al la membroj de la Eŭropa kaj de la Landaj Parlamentoj. Al la Eŭropaj Komisiono kaj Konsilio.

La artikolo 27 de la Pakto pri civitanaj kaj politikaj rajtoj, de la jaro 1976, kaj la antaŭnelonga Deklaro pri la personaj rajtoj, interalie pri la rajtoj de lingvaj minoritatoj, akceptita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj la 21an de februaro 1992, sankcias la rajton por la membroj de lingvaj minoritatoj uzadi sian propran lingvon. La Supera Kortumo de Kanado, la 15an de decembro 1988, en la procesoj Ford kaj Devine, la Komitato pri la homaj rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj, en la afero pri Kebekio de la 31a de marto 1993, kaj la Franca Konstitucia Konsilio, en sia antaŭnelonga prilingva decido de la 29a de julio 1994, deklaris ke la esprim-libereco ĝenerale kaj implicite enhavas la rajton, libere uzadi ĉiun ajn lingvon, kaj do la rajton pri la lingvo. Por efektive garantii tiun rajton, en la kadro de la nacioj kaj en la internacia kadro, necesas antaŭenigi kaj disvastigi internacian helplingvon, kia estas Esperanto. Esperanto ne estas lingvo konkurencanta kontraŭ aliaj lingvoj, kiel antaŭe estis la latina kaj la franca, nuntempe la angla kaj morgaŭ iu alia neantaŭvidebla lingvo. Esperanto estas helpa lingvo, kies antaŭeniĝo kaj disvastiĝo efektive garantius la rajton je la lingvo, kiel fundamentan rajton denaskan de la homa naturo.

Tial, ni subskribintoj petas ke:

Kiel konkretan ilon de garantio pri la rajto je la propra lingvo por anoj de lingvaj minoritatoj, sankciita de la art. 27 de la *Internacia Pakto pri civitanaj kaj politikaj rajtoj*, la Komitato por la homaj rajtoj postulu kaj kontrolu la utiligadon de la Internacia Lingvo Esperanto, en la ŝtataj klerigaj institucioj, okaze de la ekzamenado de la naciaj raporto, prezentitaj de la ŝtatoj-membroj aliĝintaj al la Pakto.

Unesko tuj ekstudu konvencion por disvastigado kaj progresiva adoptado de Esperanto kiel internacia helplingvo.

La eŭropaj institucioj:

-ellaboru detalan eŭropan enketon pri la kostoj por konsumantoj kaj servo-uzantoj, por la firmaoj kaj por la eŭropa disvolviĝo, kaŭzita de la lingva ne-komunikado inter la civitanoj de la Unio, kiel, ankaŭ, pri la

(Daŭrigo sur la paĝo 20)



## La anteno kaj la elektromagnetaj ondoj

Ĉiaj senfadenaj komunikoj komenciĝas kaj finiĝas per anteno. La elsendanto uzas antenon por generi elektromagnetajn ondojn kaj ankaŭ la ricevanto por atingi la signalojn el tiuj ondoj. Jam en la ricevilo la signaloj trapasas kelkajn etapojn kiel amplifikado kaj modulado, cele atingi la finan produkton de senfadena komuniko: la voĉo. Anteno, do, estas la ilo kiu transformas la kurentojn de alta frekvenco (nomataj RF) en elektromagnetajn ondojn aŭ male, la elektromagnetajn ondojn en RF-kurentojn.

Unu el la plej gravaj eltrovoj de la moderna scienco estis la elektromagnetaj ondoj dank' al la

angla Maxwell en la jaro 1864 kaj la eksperimenta konfirmo de la germana Hertz en 1885. Tamen ambaŭ estis sciencistoj kaj tial ili neniam pensis pri la uzado de la elektromagnetaj ondoj en la senfadena radiotelegrafio. Kelkaj jardekoj poste Marconi kaj Popov revis pri la ideo dissendi pere de tiuj elektromagnetaj ondoj.

En la desegno 1 oni povas vidi la disradiadon ĉe anteno. La RF-generatoro unue kreas la kurenton, ĉi tiel la kondensatoro kuncentrigas la elektron kaj inter la platoj P1 kaj P2 kreiĝas elektra kampo. Ĉi tiu kampo enhavas energion dank' al la RF-generatoro; ĉi ĉio provokas magnetan kampon ĉirkaŭ la

anteno.

Kiam la

anteno


finiĝas,


vidu

Elektra kampo

desegnon 2, parto de tiu energio revenas surbaze, tamen granda parto de tiuj elektromagnetaj ondoj iradas tra la libera spaco, rektlinie kiel la lumo, ĉi tiel necesas minimuma potenco por atingi grandajn distancojn.

La du unuoj plej gravaj por mezuri la ondojn estas la






La ond-longecon oni povas kalkuli pere de la jena formulo:

ondolongeco =  
(lumrapideco =  $3 \cdot 10^8$  m/sek.)

Se ni scias ke CB-radioamatoro (tiu kiu uzas la civilan bandon aŭ CB) elsendas en frekvenco proksimuma al 27 MHz, ni povos kalkuli ke la ondlongeco estas:

$\lambda = 11$  metroj

ECB7-I-046745  
STACIO ESPERANTO




frekvenco kaj la ond-longeco. La frekvenco, kiun ni nomos  $F$ , estas la nombro de cikloj po sekundo. La longeco, nomata pere de la greka litero  $\lambda$ , estas la distanco inter du punktoj de la ondo kiuj havas la saman oscilon aŭ fazon, vidu desegnon 3.

La unuo de la frekvenco estas la herco (Hz), memore al la germana Hertz, kaj siaj plej kutimaj obloj estas la KiloHerco (kHz, kiu egalas al 1000 hercoj) kaj la Megaherco (MHz, egale al 1000000 hercoj).

Lastmomente ni eksciis ke la Perkomputila Esperanto Kurso, pri kiu vi povas legi en la paĝo 18 de ĉi tiu numero, estis publikigita en la revuo *CdWare Multimedia* de septembro. Tio signifas, ke kelkaj dekmiloj da hispanoj aĉetis revuon kaj CD-ROMon kiu entenas centon da programoj, inter kiuj la Esperanto-kurso pretigita de AEU kaj havos la eblecon (se ili emas) konatiĝi kun nia lingvo.



## Krucvortenigmo



### Horizontale

- 1 Fluo de elektro pasanta tra konduktilo
- 7 Pli ol unu.
- 9 Rilata al ruino de ŝipo aŭ aviadilo.
- 10 De kiu?
- 11 Fama greka hetajro, amikino (kaj poste edzino) de Periklo.
- 12 Universo.
- 13 Direkti sian atenton al ies bono (sen finaĵo).
- 15 Vi kaj mi.

### Vertikale

- 1 Ano de protestanta sekto
- 2 Granda mamulo, el la subordo de rabobestoj.
- 3 Rilate al helena recitisto.
- 4 Komenci ŝati, komenci havi koran inklinon al iu (sen finaĵo).
- 5 Parto de la homa vizaĝo.
- 6 Fariĝi io en iu loko.
- 7 Perforte malkonstrui.
- 8 Finaĵo de kondiĉonalo.
- 14 Nederlanda monunujo.



- 16 Vokalo ripetita.  
 17 Subtera parto de plejmultaj plantoj.  
 21 Pli ol naŭcent naŭdek naŭ.  
 22 Japana havenurbo.  
 23 Artikolo.  
 24 Respekto kiun oni meritas per sia konduto (adverbo).  
 26 Ĵetilo de sagojn.  
 27 ludirekten.  
 28 Nomo de esperanta konsonanto.  
 29 Frukto de arbo, specio de prunuso.
- 15 Nomo de esperanta konsonanto.  
 18 Koama korpo.  
 19 Nomo de neesperanta, latinalfabeta litero.  
 20 Nomo de esperanta konsonanto.  
 21 Kion prestidigitistoj faras.  
 23 Nek ŝi, nek ĝi.  
 24 Tempa prepozicio.  
 25 Adverbo.  
 26 Sufikso.


Denove Krucvortenigmo por vi! Ĉi-foje, ni ricevis la plendon, ke nia lasta enigmo estis tro malfacila. Ni pruvis verki pli facilan krucvorton, malpli grandan.

Sed ne pro tio ni rezignos lotumi premion: ĉi-foje, libron ĵuse eldonita de *Grupo Nifo: La Imperio Ornaks*, unua libro de la serio *Future*. La korektan solvon vi sendu al la redaktoro (p.k. 5184, 29080 Malago) antaŭ la 15a de novembro.

Rilate la pasintnumeran enigmon, jen la solvo:

Gajnis premion nia samideano el Linares A. Escamilla Roa.

Gratulon al la gajninto... la ceteraj eklaboru! Nia poŝtkesto atendas viajn leterojn.







La valso pluas.

Estas la tempo de la vorto ĝusta  
 -siropa kompliment' aŭ ditirambo-,  
 kiu el preciozaj plukas pepojn  
 vunditajn de la ruĝ'.

Estas la tempo

de la leĝer' meringa,  
 de l' fajr' nekonesata,  
 de la prodaĵ' poltrona,

hop!:

beketi kison

-perfido de la punĉo-,  
 beketi kison laŭ la takto valsa.

Kaj... s<sup>vin</sup>g! unu du s<sup>vin</sup>g! unu du s<sup>vin</sup>g!...

La valso pluas.

La valso tuj akmeos.

La valso iĝis jam skualo fola,  
 trombo da pompo, filigran' kaj kaŝ-lascivo,  
 trompo el mosko rava, kiu preskaŭ min kuntrenas.

Kreskas la trombo, sed la vals' eksteras,  
 preteras la ŝaŭm-ondojn

ĉe la ingvenoj moŝtaj,  
 la perlajn roso-gutojn ĉe l' pudendoj,  
 la sagan ĉiel-iron  
 de la pendaĵoj gloraj,  
 la krevon de l' granatoj interkruraj,

la deziron

pudritan de la prudo.

Kreskas la trombo plue kaj ensuĉa  
 ĉion postiĉan - kiĉan -. Ho, kortezo!  
 Ho, pufo kaj parado!  
 Ho, karapacoj, maskoj kaj perukoj!



Valsas skeletoj de pingven' rikane  
kun mutaj skeletinoj de gorgono.  
Sur tombo-ŝtonoj, dume, la aliaj  
febran volupton soliteras.

Verdo

en pompejeska rubo, flagro de kurtenoj,  
formikpululo ĉe l' senbuŝaj buŝoj  
aŭ neforgesumino interdente...

Sed, revenu!

La valso de la falso daŭras plue,  
valso ripeta tede,  
ripet' koŝmare prema,  
koŝmar' sen kapo kaj sen fin'.

Revenu,

leviĝu el la seĝoj de spektantoj,  
ekpaŝu, valsu: giru kaj turniĝu,  
turniĝu plu kaj... – sving! – kaj... sving! – kaj sving  
u vin el svarmo balo-sinen, snufu  
plenpulme,  
ĝislime streĉu l' fibrojn de l' furio  
kaj longe bombe tondru: "jam sufiĉas!!!"

MIGUEL FERNÁNDEZ

*Ĉi verko ricevis la premion Eglanterio por la plej kvalita poemo pri temo  
laŭvole elektita en la 32-aj Internaciaj Floraj Ludoj.*



*(Venas de la paĝo 8)*

nederlandan, sed ne la francan!  
Alia familiano parolis la flandran  
kaj la francan, kaj tiel mi povis  
rakonti al la asekur-kompanio tio kio  
okazis al la aŭtomobilo, tradukante  
el la nederlanda en la flandran, el  
la flandra en la francan kaj fine el  
la franca en la hispanan. Kiom da  
tempo daŭris la telefon-  
konversacio? Kalkulu vi mem!

Estas utopio se ni sopiras la

komunan akcepton de ponto-lingvo,  
sed ankaŭ estas utopie revii pri la  
malapero de ĉiuj malsanoj, kaj  
tamen miloj da sciencistoj tutmonde  
laboras ĉiutage por atingi tiun  
belan revon. Jae, la angla kaj la  
franca lingvoj apertas multajn  
pordojn, tamen mi volus lasi fermita  
eĉ ne unu sola pordo, ĉar ĉiuj ĉie  
meritas kaj bezonas kompreni kaj  
esti komprenataj.

J.M.R.H.





## 10 sciindaj aspektoj pri Esperanto

Komunumoj aŭ esperantistaj propraj Ŝtatoj.

Fine de la 20a jardeko ekzistis en Krimeo kolektiva vilaĝo, aŭ kolĥozo, nomata *Nova Vivo*. Ĝi estis kreita de judaj komunistoj kiuj foriris el Palestino seniluziigitaj de la cionismo. Pro la fakto ke la sovetaj aŭtoritatuloj malpermesis paroli la hebrean, la anoj de la komunumo elektis esperanton. *Nova Vivo* malaperis pro la stalinaj elpurigoj.

En 1912 la germana bankisto Schuler proponis donaci al la esperantistaro grandan spacon da tereno, pli malpli cent hektarojn, en Grafelring. Laŭ la planoj oni konstruus urbon nur por esperantistoj. Konata arkitekto ellaboris planon de la urbo kaj la afero ekmarŝis. Oni projektis konstrui domojn, teatron, kazonon, hotelojn, ktp. Bedaŭrinde la projekto fiaskis ĉefe pro manko da sufiĉaj ekonomiaj rimedoj.

Nuntempe la ideo fondi esperantistan internacian komunumon restas tre alloga, ĉefe por tiuj, junaj aŭ ne, kiuj deziras loĝi kune apud la naturo. En la Esperanto-movado ekzistas la asocio *Hejmoj de Internacia Kulturo* kiu celas disvolvi internacian kulturon per esperanto en komunuma energiviglado per esperanto. Revuo sub la nomo *Hejmoj* estas eldonata de la asocio, kiu posedas sidejon en Balagué (Francio), kie eblas resti en trankvila etoso apud la naturo.

Antaŭ la dua mondmilito, kelkaj geesperantistoj, ĉefe pro la mezeŭropaj persekutoj, iris loĝi komunume. Tio okazis en *Esperia*, komunumo kreata en Valance d'Agen (sude de Francio). Por loĝi tie oni devis esti esperantisto kaj vegetarano, kaj se eble ankaŭ nudisto. La loko allogis multajn esperantistojn, ĉefe SATanojn.

En tiu sama epoko, 1934, aperis anonco sur la paĝoj de *Heroldo de Esperanto*, kie oni proponis fondi Esperanto-komunumon en loko de la tropiko, ne klarigita en la anonco. La pioniroj devis alporti, kune kun kuraĝo kaj decidemo, propran sumon inter 3000 kaj 5000 germanaj markoj.


Tamen, kelkfoje, sub la ideo fondi E-komunumon kaŝiĝas strangaj projektoj, ekzemple tiu pri la Insularo Hespérides, mistera teritorio, jam la nomo memorigas nin pri misteraj insuloj de la antikveco, apud la Suda Poluso. La *registaro* de la Insularo Hespérides prezentiĝis perletere al NU kaj al tiuj Ŝtatoj kiuj fiksis aŭ pretendis fiksi bazojn sur la Suda Poluso. La skribaĵoj, kvankam redaktitaj en la lingvo de la ricevanto, uzis Esperanton por la ŝtampiloj.



Aliaj projektoj ne estis klare diskonigitaj, ekzemple tiu pri *Akvonezio*, kiu anonciĝis ĉe *Heroldo* kiel esperantista ŝtato proponante al la filatelistoj disvendi siajn *naciajn* poŝtmarkojn.

Tamen la ideo pri esperantista komunumo aŭ eĉ ŝtato estas alloga ĉe la samideanaro. Antaŭ kelkaj jaroj oni lanĉis konkurson sur la paĝoj de la revuo *Monato*. Oni proponis teatr-scenon kie la roluloj konversaciis pri la ideo fondi esperantistan ŝtaton en Birobiĝano, imaga eks-sovetia lando en Azio. La celo de la konkurso estis proponi duan scenon kie la roluloj, dek jarojn poste, parolis pri la sukceso aŭ fiasko de tiu ideo. El la tri premioj aljuĝitaj, la unua temis pri la ne-kreado de la lando; la dua pri la fondigo de esperantista ŝtato tamen ne en Azio sed meze de Eŭropo; kaj la tria temis pri la reala sukcesa fondiĝo de tiu ŝtato en Azio, kie estis demokrata oazo meze de la kontinento.

La plej serioza (kaj eĉ sukcesa) pruvo fondi esperantistan ŝtaton okazis en la jaro 1908 en la neŭtrala urbo *Moresnet*, apud Belgio. *Moresnet* estis urbeto kies mina riĉeco provokis konfliktojn inter la najbaraj ŝtatoj (Germanio, Belgio kaj Nederlando). En la 19a jarcento oni akceptis deklari tiun urbeton neŭtrala teritorio sub la regado de la propra Urbodomo. Komence de la 20a jarcento grupo de esperantistoj gvidataj de la belga *Gustave Roy* lanĉis la ideon fondi tien esperantistan neŭtralan Ŝtaton, sub la nomo *Amikejo*. La 27an de decembro de 1908 grupo de 150 geesperantistoj hisis la esperantistan standardon kaj kantis la himnon



*Amikejo*. Tamen ne ĉiuj samideanoj entuziasmiĝis pri la projekto: en la 4a Universala Kongreso de Esperanto oni parolis pri la danĝero por nia lingvo enmeti sin en projekto miksita kun politikaj problemoj; same la loĝkondiĉoj de la urbo ne estis tre allogaj. Do, ĉi ĉio, kune kun la forpaso de la iniciantoj (*Gustave Roy* mortis en 1911) provokis ke la esperantistaro seniluziiĝis baldaŭ pri la projekto.

Hodiaŭ la projektoj pri internaciaj esperantistaj komunumoj estas reaalaĵo dank' al la streboj kaj atingoj de la asocio *Hejmoj de Internacia Kulturo*. Pri la fondiĝo de esperantista ŝtato, sendube hodiaŭ estas nesupozebla revo, tamen el la historia vidpunkto estas pritraktinda temo por la studentoj de la sociologio de la Esperanto-Movado.

J.M.R.H.



## Recenzoj

### Perkomputila Esperanto Kurso (PEK)

La nomo estas iom nekompleta: temas pri perkomputila esperanto kurso *baza*. La historio de ĉi tiu programo estas iom longa. Kiel oni povas legi surekrane, ĝian unuan version programis, en la angla iu Todd Moody, el Filadelfio (Usono). Ĉi tiu programo atingis niajn samideanojn de Portugala Esperanto Asocio, kiuj, helpe de amiko neesperantista (Zénuno) reprogramis ĝin tute. Kiam ili provis ekkontakti la aŭtoron, tiu estis netrovebla. Nur poste ili dissendis iom la programon, kiu atingis AEU-n (pli ekzakte, la redaktoron de ĉi tiu revuo), kiu tradukis kaj adaptis ĝin hispanlingven.

Kion oni bezonas por uzi ĉi tiun PEK-on? Unue, komputilo PC-kompata, ne gravas kiom potenca. Nu, la surekrana aspekto de la programo estas ege simpla: la programisto tiel akcelis, ke eĉ ege nepotencaj maŝinoj povu uzi ĝin. La tradukon hispanlingven oni tajpis sur komputilo AT (tio estas, 80286), nur 16 Mhz-rapida, kiu nuntempe estas preskaŭ fosilo, kaj sur ĝi la programo funkcias tre rapide (oni ne devas atendi, por ke la komputilo ŝanĝu la ekzercojn aŭ korektu ilin). Komprenoble, se la maŝino estas pli bona, la aspekto iom pliboniĝos. PEK funkcias de la disketo, sed komprenoble preferindas uzi ĝin de malmola disko (pro rapideco).

Kaj kion liveras PEK? Nu, bazan kurson, komprenoble. La programo ne intencas instrui esperanton ĝis oni povos paroli ĝin flue. Pli ĝuste ĝi servos kiel enkonduko kaj komplemento por la lernado. Ĝi liveras ankaŭ ĝeneralan informon pri Esperanto (ĝia historio, literaturo, movado), pri ties prononco kaj alfabeto, tabelvortoj kaj ankaŭ sescentvortan vortareton dudirektan (kiu entenas nur la vortojn necesajn por la kurso).

La sistemo de la kurso estas simpla. Ĉiu leciono konsistas el unu ekrano, kiu klarigas unu regulon de la lingvo. Fine, oni proponas al la lernanto demandon pri tiu regulo. Ekzemple, ni vidu la lecionon 34an:

-SEKA        seco(a)        IĜ-        (v. intrans.)  
-NASKI        parir                SUNO        sol

El sufijo -IĜ- funkcio de manera semejante a -IG-, pero en vez de significar "hacer..." o "volver..." significa "hacerse..." o "volverse...". O sea, en vez de describir la acción de un sujeto sobre un objeto (por eso IGI es siempre transitivo), describe el estado en que el sujeto termina (y es siempre intransitivo).

Así, LIBERIĜI, NALSEKIĜI, DECIDIĜI, RUĜIĜI y SUNBRUNIĜI significan respectivamente "liberarse", "enajarse", "decidirse", "enrojarse" y "broncearse".  
Sabiedo esto, traduzca: «¿Cuándo naciste?»



Oni povas provi tri fojojn: se oni ne trovas la korektan solvon, la komputilo montros ĝin surekrane. La precipa problemo estas, ke se oni forgesas finan punkton (.) aŭ se oni uzas alian vortordon ol tiun, kiun la programisto entajpis en la programon, la komputilo ne agnoskos tian solvon korekta. Kiel videblas, surekrane la ĉapelitaj literoj ne aperas kiel kutime. La kialo estas la deziro de la programisto, ke en ĉiu ajn komputilo oni povu uzi PEK-on. Tiel, la ĉapelon anstataŭis simpla streketo sur la litero. Estas tre facili entajpi ĉapelaĵon: oni simple tajpu majusklan literon; do MAJ. + g = Ĝ, MAJ. + s = Ŝ. Surekrane, ĉiuj literoj, ĉapelitaj aŭ ne, estas majusklaĵaj. La kurso enhavas 98 lecionojn; de la plej simpla (la substantivoj finiĝas per -o, la artikolo estas la) ĝis la pasivo, la atribulado, ktp. Ekzemple, en la leciono 95 oni devas esperantigi la sentencon: *Aunque nieva, vamos a visitar al abuelo, que, a pesar del frío, está mejor de salud.* Kiel oni povus plibonigi la kurson? Oni povus modernigi ĝin, ekzemple, eldonante *Windows*-version, kio ebligos plibonigi la aspekton ĝeneralan kaj de la ĉapelitajn literojn; kaj granda plibonigo estus inkludi voĉon en la programo. Tamen, tiu farus, ke oni bezonu potencan komputilon (verŝajne 80386, kun voĉa ilo *SoundBlaster* aŭ kompata). (Se iu voluntulo ŝatas la defion modernigi ĉi tiun programon, bonvolu komuniki tion al la redakcio de *Gazeto Andaluza*.)

J.F.M.P.



(*Venas de la paĝo 9*)

perspektivo de Esperanto kiel federacia lingvo kaj ties eventualaj aplikaj fazoj;

-faru la studojn kaj la elpaŝojn necesajn por ke Esperanto fariĝu jure referenca lingvo de la Eŭropa Unio;

-apogu kaj iniciatu la uzadon de Esperanto kiel ilo por pli bone kaj pli rapide lerni la fremdajn lingvojn kaj, ĉefe interne de la institucioj mem, la uzadon de la Internacia Lingvo kiel *ponto lingvo*, kiam ne-eblas rekta interpretado aŭ tradukado;

-adekvate financu eŭropan eksperimentado pri instruado / lernado de Esperanto, kontrolante kaj diskonigante ties rezultojn.

Esperanto Radikala Asocio  
Via di Torre Argentina 76  
00186 Roma (Italio)

E.R.A.



## Politiko, Lingvo kaj Esperanto

La vivo en si mem konsistas el multaj kaj diversaj eroj kaj ecoj, kiuj konstante nin akompanas. Tiuj eroj kaj ecoj fariĝas la radikoj, el kiuj kreskas nia ĉiutaga vivo. Ni estas al kutimiĝintaj al tiuj fenomenoj naturaj, kiuj siavice ŝanĝiĝas kaŭze de la naturo mem aŭ pere de nia konstanta kaj ĉiutaga agado.

Nia ofta monotoneca vivo aŭ la al kutimiĝo al io ĉiam ekzistanta, al tio kion ni ĉiam konas sub la nomo: jen la vivo metas nin en plenan rutinecon. Rutino, kiu ĉiam enhavas grandajn valorojn kaj pri kiuj ni apenaŭ atentis. Jen.

Estas du aspektoj en la vivo de la homo, kiuj en mia opinio, havas eksterordinarajn valorojn, kaj pri kiuj ni malofte atentis. Tiuj du valoroj de nia ĉiutaga vivo estas la politiko kaj la lingvo. Ĉu strange? Ĉu la politiko estas granda valoro de nia ĉiutaga vivo? Kial? Aŭserti tion ne multe kongruas kun la opinio ĝenerala pri la politiko ekzistanta en nia socio, kie ĉiam regas la kriterio, ke la politiko estas abomenaĵo. Nu, momente restu, kvazaŭ bona tiu opinio kaj ni okupiĝu almenaŭ iomete pri la lingvo. Jen la lingvo, la plej normala ero el la ĉiutaga vivo de la homo. Ridinda, ĉu ne? La lingvo estas io uzata de ĉiu homo ĉiam; en tio jam estas nenio novaĵo. Kontraŭe al la politiko, la ĝenerala opinio pri la lingvo estas tute favora. Kaj meze de tiuj radikoj, sur kiuj baziĝas nia vivo kaj interligante ilin troviĝas ni kaj nia kara Esperanto. Estas kompreneble, ke vi ĉiuj demandos vin, nu, kia rolo estas tiu de la politiko kaj la lingvo kaj Esperanto? kaj krome vi povas aldoni, kiamaniere oni povas kuiri tiun miksaĵon? Mi intencas esti bona kuiristo kaj prezenti al vi pladon, kiu malfermos vian apetiton rilate al scio pri tiuj ingrediencoj, nome, politiko, lingvo kaj Esperanto.

Unue, la politiko, kio estas la politiko? Mi ne scias vian opinion, sed mi difinas la politikon jene: la politiko estas la scienco, kiu okupiĝas pri la distribuo de la rento, kiun produktas la laboro. Ĉu vi konsentas? Ĝenerala opinio estas, ke la politiko estas malpuraĵo kaj tiu opinio estas terure erara. La politiko en si mem estas nek bona, nek malbona, nek blua, nek blanka, nek flava... La politiko estas la plej pura scienco ĝis hodiaŭ konata en la vivo de la homaro. Jes, poste venas la politikistoj, kaj estas ĉi tie kiam komenciĝas la problemoj kaj la malbonaj opinioj de la plej granda parto de la civitanoj. Ĉiu politikisto uzas la politikon siaprofite (kaj por tio uzas la lingvon), do, kaj ĉar ekzistas multaj kaj diversaj politikaj opinioj por distribui la renton, kiun produktas la laboro, la politikistoj eksponas



programojn, mensogas, triumfas, fiaskas, promesas, perfidas, sukcesas, insultas, amikiĝas kaj rapide malamikiĝas: resume ili komencas makuli la politikon, do la politiko ne plu aperas pura kaj klara, kia ĝi estas. Do, estas bone, ke ĉiu distingu ĉion rilatantan al la politiko kaj ĝia rolo en nia ĉiutaga vivo.

Tre ofte ni aŭdas diri: ne, pri politiko vi ne parolu al mi, mi deziras scii nenion pri politiko, sed iumaniere ĉiu *politikumas*. Estas evidente, ke oni devas distingi inter politiko aktiva kaj pasiva. Eble en Esperanto ni povas difini pli klare pri politiko aktiva, se ni uzas la vorton politikistoj, tio estas civitanoj, kiuj profesie aktivas en la politiko kaj civitanoj, kiuj tre interesiĝas pri la politiko, prenas parton en la Esperanto-Movado. En la grupo politiko pasiva troviĝas ĉiuj ceteraj personoj, kvankam en ĉi tiu grupo la varieco estas granda. Estas tiuj, kiuj asertas, mi neniam interesiĝas pri politiko, tio ankaŭ ne estas vero. Malgraŭ tiu aserto li ne pravas, ĉu li neniam kritikas la altajn prezojn de la varoj, la plialtigon de la impostoj? Nu, tio ankaŭ estas fari politikon. Aliaj diras, mi neniam prenas parton en balotado, tio simple signifas ke ili faras sian propran politikon.

Nu, nepre oni devas akcepti, ke la politiko estas efektiva en la vivo de ĉiu civitano. Alia aspekto grava en la vivo de la homaro por reciproka komunikado inter siaj samspecanoj estas la lingvo. Kio okazus se ne estus lingvo/j? La lingvo estas gardanto de la arkivo de la historio, ĉar ĉu povus ekzisti historio se ne estus lingvo/j? Do, la politiko ŝuldas al la lingvo/j sian ekzistadon. Ĉu povus ekzisti politiko sen lingvo? Do, la interrilatoj de la politiko kaj la lingvo estas fenomeno natura. La homo deziras esprimi siajn sentojn, ideojn, rilate al la kunvivado kaj nepre devas uzi la lingvon.

La lingvo naskiĝas samtempe kun la homo, kvankam poste estos necesaj diversaj tempoperiodoj por edukado aŭ adaptiĝo de la homa estaĵo al la lingvo aŭ lingvoj parolataj. Kaj meze de ĉi tiu lingva adaptiĝo aŭ edukado troviĝas la politiko. Unue la politiko ekzistanta, ĉion metas por ke la ĵus alveninto al ĉi tiu mondo, restu ĉiam flanke de sia politiko, por tio la politiko uzas la lingvon.

La lingvo siaflanke uzas la politikon por sia disvastigo. Vi povas atenti, ke mi ne uzas la vorton politikiston, ĉar en ĉi tiu kunligo lingvo/politiko, la politikistoj nur estas simplaj perantoj, kiuj evidentigas la rolon de la politiko kaj la lingvo en la ĉiutaga vivo de la homo.

Post tiu simpla analizo pri politiko kaj lingvo, troviĝas la grava problemo, ke ekzistas multaj politikoj kaj multaj lingvoj, kiuj starigas multajn konfliktojn. Nu, jen iuj el la gravaj malfacilaĵoj por la homa kunvivado. Rezulte de ĉi tio, la homoj grupiĝas laŭ politika kredo kaj parolata lingvo,



sed paradokse tre ofte ne koincidas la parolata lingvo kun la politiko ekzistanta kaj aperas la homo dividita sen scii kion fari. Kion vi pensas, ĉu en ĉi tiuj situacioj ne estas necesa la rolo de Esperanto?

Do, la homoj kreas siajn proprajn grupojn laŭ politikaj tendencoj kaj eĉ lingvaj. Ĉu tio estas bona aŭ malbona? Ĉi tiu demando havas ege malfacilan respondon, ĉar la diverseco tiusence estas granda kaj tre diferenca. Eĉ vi povas konstati en la Internaciaj Esperantaj eventoj, ke la ceestantoj grupiĝas laŭ landoj kaj lingvo parolata, do, jen hispanoj kun hispanoj, germanoj kun germanoj, ktp. ktp. Kaj pensu, ke tio okazas en niaj vicoj, en kiuj regas la ĝenerala kredo, ke ni havas la Internacian Lingvon Esperanto kiel rimedon por solvi la baron lingvan. Malgraŭ ĉio, estas evidente ke ni esperantistoj troviĝas sur la taŭga vojo por solvi ĉi tiun problemon lingvan, kiu siavice havus grandan eĥon en la politiko. Parto de ĉi tiu agado de la esperantistoj en la Internaciaj Esperantaj eventoj, devenas de nia politia edukado, kiu kontrolas nin kaj montras al ni la vojon sekvendan. La demando estas, ĉu en la okazo, ke niaj internaciaj kunvenoj estus pli oftaj, malaperus tiuj grupoj de esperantistoj laŭ landoj kaj lingvoj aŭ, male, alkiutimiĝintaj al la tuja interkompreno, daŭre ekzistus la jam plurfoje menciitaj grupoj?

Estas vero, ke la lingvo grupigas la homojn, sed ankaŭ estas vero, ke la lingvo izolas la homojn. Fako tre ofte profitata de la politiko (de la malbona politiko). Homoj parolantaj minoritatan lingvon grupiĝas fervore por savi kaj daŭrigi sian lingvon. Fakte ili tute pravas, sed vero estas ankaŭ, ke ili izoliĝas. Ĉi tiuj cirkonstancoj kondukas la homojn al tre gravaj konfliktoj de kunvivado. Ofte ĉi tiuj konfliktoj estas starigitaj de la malbona politiko. Evidente, ni esperantistoj havas la solvon por tiuj problemoj, sed ĉu vere? Jen ekzemplo: en Jugoslavio batalas esperantistoj kontraŭ esperantistoj, kaj serboj kontraŭ serboj, kiuj parolas la serban lingvon. Meze de ĉi tiu konfuzo lingva troviĝas la politiko. Politiko, kiu estas uzata malracie fare de politikistoj (kvankam pri politikistoj kaj lingvoj mi revenos en alia tago).

La realo esas la jena: jen la politiko kaj la lingvo, kiuj sendiskute povus alporti feliĉon al la homaro. Tamen ĝis hodiaŭ oni povas diri, ke la lingvo kaj la politiko alportis ĉiam multajn ĉagrenojn. Tamen rifuzi la fakton, ke la lingvo kaj la politiko ne estas forte ligitaj, tio estas sin meti for de la realo. Kaj vole aŭ nevole, nia Esperanto-movado troviĝas ankaŭ meze de ĉi tiuj cirkonstancoj. Ĉiu civitano estas devigata uzi la lingvon kaj la politikon, neniu povas resti for de tiuj nediskuteblaj asertoj. La konkludo estas, ke tiuj esperantistoj, kiuj rigardas la politikon kiel venenigan



manĝaĵon, restas for de la realo.

Evidente, pli bone estus se ĉiu homo havus la saman kriterion politikan, tio donus gravan impulson por solvo de multaj lingvaj problemoj. Ĝis la homo ne atingos pli altan socian edukadon, ni daŭre devos vivi kaj kunvivi en ĉi tiu situacio de la politiko kaj la lingvoj.

LUIS SERRANO PÉREZ



## Esperanto Aplikata

1. Serĉas laborpostenon en Ĉinio en esperantista firmao, kiu okupiĝas pri importo-eksporto aŭ alilanda turismo s-ro Ivan Nikolov. 32-jara fraŭlo kun supera ekonomia klero; paroles bone Esperantan kaj rusan lingvojn, parte germanan kaj anglan; havas sciojn pri internacia komerco kaj spertojn en ĝi kun landoj el eksa Sovetio. Proponojn pri laŭkontraktadungo por 1-3 jaroj sendu al ESPER-KOMERC, Ivan Nikolov, Ekzarh Josif, 7, p.k. 2, BG-5250 SVISTOV, Bulgario.

2. S-ro Miroslav VOLNÝ, Palkovice 484, Ĉr-739 41 FRYDEK-MISTEK, tel./fakso 0658/23385 ofertas vinojn, alkoholaĵojn, naturajn manĝaĵojn; petas informojn/produktojn por ŝparo de energio.

3. Komerca filio de ŝipfabriko eksportas: elektrajn motorojn, cementon, lesivon, galanterion, teon, ktonaĵon,

manĝaĵojn. S-ro Tuo jiu, Wuhuaocuanchang, CN 241000 Wuhu, Anhui, fakso (0553) 332708.

4. Amonio para-volframa (amonio para-tungstena, APT...) en plastika sako kun fera sitelo ekstere; USD 9000 /tuno, FOB Ŝanhajo. S-ro Sun Rong Vao, room 208/920, Qinzou Road, Shanghai.

5. Eksporto de diversaj varoj (precipe tekstilaĵoj); importo de kotono el Rusio (prezofertoj en usonaj dolaroj). Prof. CUI Jianhua, Nanjing Universitato, Departemento Aplikata Fremdlingvo, CN-210093 Nanjing; fakso (25) 3304463, E-poŝto...

6. Muzikisto-koncertisto prezentas i.a. albumon (80 minuta) pri poemoj de *Ibere-Libere* grupo, 4 voĉoj, pli ol 40 instrumentoj / stiloj, kun tekstkajero. Kosto de kasedo po





1900 pesetoj + sendokostoj; rabato ekde 5. Eduardo Vargas Gutiérrez, C/ Ayala 3, E-29002 Málaga, (9)5-2343296.

7. Fondaĵo Ruben Um Nyobe bezonas por kampara disvolviĝado: fabrikojn por prilaborado/produktado de teksaĵoj, ĉokolado, palama oleo, cemento, ligno. Interŝanĝe eblas liveri kakaon, kafon, bananojn, arakidojn, kotonon, lignon, karbon, palman oleon, palmajn nuksojn, ne tanitajn bestohaŭtoj ktp. Dr Jean MOUTYMBO, Clinique Nouvelle, B.P. 861, Douala, Cameroun; tel: prefere je 19a h., (237) 371881.

8. S-ro Jean Marie Mboge-Mbele havas kontaktojn kun grava ligno-eksportisto. Interesitoj bonvolu kontakti li per fakso 237-432420.

Esperanto Klubo (Timofej Ŝuvaev - Olga Ĵukova), str. 60 Let Oktjabrja 6-135, RUS-626440 Nijnevartovsk-6 (Siberio, Rusio) serĉas komercajn kontaktojn.

9. La ministerio pri ekonomio de la brusela regiono proponas vizitojn al entreprenoj. Oni celas delegitojn kiuj vizitas Belgion kaj ŝatas ekkoni la industrian aspekton de Bruselo. Informoj: tel. 32-2-410 99 50.

10. Cafetería *Copacabana*, C/ San Pancracio, Ed. Terminal I, 29640 Fuengirola,

Malago.

11. Fariĝu membro de *Internacia Tradukreto pere de Esperanto*. Ĉi tradukreto laboras en ĉiuj fakaj aferoj: komerca aŭ kultura, ŝtata aŭ neŝtata, profitcela aŭ homcela. Adreso: Daniel Durand, Les Nids, 49190 Saint Aubin de Luigne, Francio. Tel: +41 78 47 45, fakso + 41 78 32 77.

12. SOL FUERZA. Organika karburajo oksigenita. Gamo da ekologiaj produktoj, inventitaj kaj fabrikitaj en Hispanio. Sol Fuerza, S.L. Bio-karburajoj. Gladiolos, 40, Fuengirola (Malago).

13. *Bone dormi, bone vivi*. Labor- kaj negoc-ŝanco por distribuantoj kaj vend-agentoj. Terapiaj produktoj el pura merina lano. Per la naturaj produktoj Merino, ni atingis plaĉan ripozon je konstanta temperaturo kaj sen humideco, ĝuante grandan protekton, forigante humidecon. *Bone dormi, bone vivi*. GENTE GUAPA, S.L., Avda de la Rosaleda, 3-1<sup>o</sup> dcha, 29008 Malago. Telef. kaj faks. (95)2216414.

14. DAKER, S.L., ceramiko de Damián Ponce. Venta José María *El Tempranillo*. 29312 Villanueva del Rosario, Malago. Telef. kaj faks. (95)2742278 kaj 2111362.

15. Marketrejo SALINAS.



Nia katalogo enhavas la plej reprezentajn modelojn de la tradicia marketro granada. Marketrejo SALINAS, Societo Kooperativa Andaluzia. Iglesia, 1, 29315 Salinas (Malago). Telef. (95) 2714026. Fakso: (95) 2714504.

16. Programo PROSOL. Renoveblajn energiojn en Andaluzio. Varman akvon per suna energio. La energio suna ne atakas nian medion. Pli ol 4000 sunaj instalaĵoj en Andaluzio. Por pliaj informoj turnu vin al SODEAN (Societo por la Disvolvado Energia de Andaluzio). Telef: (95) 4626001 / 4626011. Fakso: (95) 4626301.

17. NATURAJ AROMOJ. Aromokuracado. Naturaj produktoj inhalitaj efikas tiom kiom tiuj kiuj eniras la korpon englutitaj, injektitaj. GENTE GUAPA, S.L., Avda de la Rosaleda, 3-1<sup>a</sup> dcha, 29008 Malago. Telef. kaj faks. (95)2216414.

18. Herbovendejo *Don Natural*. C/. Magistrado Salvador Barbero, 12, 29010 Malago. Telef. (95)2611117

19. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo proponas al vi:

—*Pandemonio*, aro da rakontoj de junaj hispanaj aŭtoroj (500 pesetoj)

—*Solo*. Disko de malaga esperantista muzikisto, ±25 minuta (500 pesetoj).

Plus sendokostoj. AEU, p.k. 864, 29080 Malago.

20. Komerce pretigita tekstoprilaborilo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde Vindozo 3.0. Helpsistemo kaj manipulado pure en Esperanto. Enkonduka prezo 200 germanaj markoj. Adreso: Professional Consulting, S-ro PEJNO Simono, Am Fülgarten 4, D-61250 Usingen. Tel: +49-6081-66722, Fakso:+49-6081-3955.

21. AZAHAR, herbovendejo kaj natura kosmetiko. Avenida San Sebastián 3, ejo 5, zona Eugenio Gross, Málaga. Horaro: 9-14 kaj 17-21.

22. Privataj klasoj de latino. José Gil Martín, Corregidor C. Garafa, bl. 11 bis, 5<sup>o</sup> D, Apartado 650, 29080 Malago. Tel. 233 74 86.

Ĉi tie oni povus legi VIAN anoncon. SENPAGE. Aŭ tiun de viaj amikoj, najbaroj... Simple skribu leteron al ni, kaj vian anonceton aperos en nia venonta *Gazeto Andaluzia*.

ASEMBLEO GENERALA DE AEU

Por la presente, convoco a todos los miembros de la Asociación Andaluza de Esperanto (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo) a asistir y participar en la Asamblea General de esta Asociación que tendrá lugar el día 21 de octubre de 1995, a las 16.00 horas en el Local 7 del Pasaje Mármoles, Málaga, para tratar los siguientes asuntos:

Lectura del Acta de la reunión anterior  
Estado de Cuentas  
Cursos  
Nuestras publicaciones en las bibliotecas  
Turismo  
Informes de grupos y miembros aislados  
Relaciones de AEU con ERA, HEF, IKEF y Cámara de Comercio  
Ruegos y Preguntas

Málaga, 1 de septiembre de 1995  
El Presidente de la Asociación Andaluza de Esperanto

Fdo.: Andrés Martín González

-----  
En caso de no poder asistir personalmente a la Asamblea, puedes autorizar a otro miembro de la Asociación para que te represente y vote en tu nombre.

Autorizo a.....  
miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo), para que en mi nombre, vote las propuestas que se presenten en la Asamblea General de esta Asociación que se celebrará en Málaga el 21 de octubre de 1995

....., ....., ....., 1995  
Firmado: .....

---

Mi alvokas ĉiujn membrojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo por ĉeesti kaj partopreni Ĝeneralan Asembleon de ĉi tiu Asocio, kiu okazos la 21an de oktobro, 1995, je la 16.00 horoj en Local 7, Pasaje Mármoles, Málaga, por pritrakti la jenan tagordon:

Legado de la akto de la antaŭa kunveno  
Bilanco de la Asocio  
Kursoj  
Niaj eldonaĵoj en la bibliotekoj  
Turismo  
Informoj de grupoj kaj izolitaj membroj  
Interrilatoj de AEU kaj ERA, HEF, IKEF kaj Komerca Ĉambro  
Petoj kaj Demandoj

Malago, la 1an de septembro, 1995  
La Prezidanto de AEU

## D O K U M E N T O J D E L I G O D E N A C I O J

### Komisiono pri Intelektita Kunlaborado

Du gravaj roluloj: 1) Torres de Quevedo (Hispanio) proponas ke kun la helpo de fakuloj oni studu la eblajn solvojn al la lingva problemo; Gonzaque de Reynold kontraŭas al tiu propono kaj al Esperanto. Generale, la membroj de la Komisiono neniom aŭ preskaŭ neniom sciis pri la afero diskutota.

Inter aliaj, Destree (Belgio) kaj Luchaire apogis s-ron Reynold; Lowes Dickinson kaj D-ro Nitobe troviĝis en la grupo kiu subtenis la proponon de s-ro Torres de Quevedo.

Rezulte de la antaŭjuĝoj kaj manko de elementaj scioj de la plinulto de la membroj, la Komisiono decidis ne konsideri la demandon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, nek rekomendi ke la Ligo atentu la "artefaritan lingvon".

### Kvara kaj Kvina Asembleoj

En 1923, sine de la Kvara Asembleo, Jacques Bardoux (Francio) klopodis profiti la negativan respondon de la Komisiono pri Intelektita Kunlaborado kaj definitive nuligi Esperanton. Plie, en la Kvina Asembleo proponis rezolucion rekomendantan la studon de naciaj lingvoj anstataŭ la "artefarita helplingvo". Tamen, pro manko de apogo de aliaj delegacioj, Bardoux retiris sian proponon.

En 1924 okazis gravaj ŝanĝoj en Francio. Herriot, ĉefministro, nuligis la cirkuleron de Berard laŭ kiu estis malpermesita la instruado de E-o kaj eĉ subtenis la proponon de la persa, japana, ĉina, nederlanda kaj aŭstralia delegacioj laŭ kiu oni devis rekoni Esperanton kiel "klara lingvo" en telegrafio. La proponon akceptis la Kvina Asembleo per 13 voĉoj kontraŭ 9 kaj la Plena Kunsido de la Asembleo konfirmis ĝin unuanime.

En 1925, dum la Konferenco de Universala Telegrafa Unio (ekde 1932 Unio Internacia de Telekomunikado) okazinta en Parizo, oni studis la rekomendon de la Ligo de Nacioj. Rezulte de tio la Konferenco amendis la paragrafon 3 de la Art. VII de sia Statuto aldonante Esperanton al la grupo de lingvoj kies uzo estas permesita.

Bonsorte tiu decido ankoraŭ restas senŝanĝa.

000000000

000

000000000